de N. Bartelmes pri *„E. Lanti en siaj lastaj vivojaroj"*, de Prof. G. Waringhien pri *„La magio hieraŭ kaj hodiaŭ"*, de Terano pri la *„Fizionomio de Maroko"*, de M. Leereveld pri *„Virinlaboro en Aŭstralio"*, de Forbath-Reininger *„Memore al Garcia Lorka"*, de F. Boyet pri *„Kulturo, klereco, kaj mensa edukado"*, de Andreo *„Iom pri Usono"*, de S. M. Perlmann — P. Meyer pri *„La Judoj en Ĉinio"*, de A. Siegfried (membro de la franca akademio) (trad. Laval) pri *„Tekniko kaj kulturo en moderna civilizacio"*, de P. Neergaard pri *„Kiel la sciencistoj donas nomojn al la plantoj?"*, de J. Régulo-Pérez pri *„Mito kaj scienco pri Atlantiso"*, de N. Bartelmes: *„La marionetoj dancas"*, de K. Dellian pri *„Principoj de terminara kreado"*. Konklude: jen denove nepre rekomendinda kajero. — W. P. R.

342.24 : 914
914 : 408.92

## KOMUNIKOJ

### Eŭrop-federalisma kunveno dum la universala kongreso

Estos aranĝata dum la 40a Universala Kongreso de Esperanto en Bolonjo speciala „Eŭropo-Kunveno", kiu havos la jenan programon.

*Propaganda antaŭkunveno* por la ĝenerala publiko neesperantista, precipe por la lokaj federalistoj, okazos lundon, la 1-an de aŭgusto je la 18a h. en salono disponigota de la loka sekcio de la federalista movado (ĉe „Associazione Commercianti", Strada Maggiore 23) kun la temo „Esperanto kaj Eŭropo". La prelegoj okazos en Esperanto kun tuja traduko nacilingva.

*La „Eŭropo-Kunveno"* malfermiĝos merkredon, la 3an de aŭgusto je la 16a h. kun la jena tagordo:

Malferma parolo de la prezidanto de la kunveno s-ro Pierre Petit.

Prelegoj:

Prof. Ivo Lapenna: „Eŭropo kaj la federacia principo".

Inĝ. Giordano Azzi: „Kial urĝas federaciigi Eŭropon".

S-ro Umberto Broccatelli: „Agaddirektoj de la Eŭropa federalisma movado".

S-ro Lucien Laurat: „Eŭropo bezonas Esperanton - Esperanto bezonas Eŭropon".

D-ro Wilhelm Herrmann: „La Eŭropa kampanoj por Esperanto".

Ĝenerala diskuto kaj invito por la starigo de esperanto-asocio de eŭrop-federalistoj. (Laŭ la opinio de la proponintoj la fondota asocio devus aliĝi al U.E.A. kiel kunlaboranta fakasocio kaj al la Unio de la Eŭropaj Federalistoj).

La kunvenojn ĉeestos oficiala reprezentanto de la itala „Movimento Federalista Europeo".



061.22 I.S.A.E.

## ISAE-INFORMOJ

**Mortis** nia membro inĝeniero Hisakazu Sato, Japanujo, en la jaro 1954 kaj nia membro sinjoro Johannes Bauer, Germanujo, en decembro 1954.

**Dana delegito.** Nova adreso: Farm. kand. Vagn Jørgensen, Vinkelvej 17, *Ringe* (Fyn), Danujo.

**Delegito por Alĝerio:** Sinjoro Paul Touron, B.P. 122, *Alger*. La jarkotizo estas 600 francaj frankoj.

**Nederlando.** Nova adreso de la sekretariejo de la Asocio Nederlanda de Scienculoj Esperantistaj: Plataanweg 18, *Rotterdam (Schiebroek)*, Nederlando. Sekretario estas sinjoro F. Winkel.

**Dro W. Solzbacher,** membro de ISAE, ricevis la titolon „Chief of the Monitoring Staff" of the „Voice of America". Ni sincere gratulas.

**Terminologio**

*Odontologio.* D-ro P. Zlatnar, Rimska 7/II, *Ljubljana*, Jugoslavio, preparas dentistan terminaron, kaj petas kunlaboron de aliaj dentistoj.

*Arto.* S-ro J. Vranĉiĉ, Breŝĉenskoga 6, *Zagreb*, Jugoslavio, kolektas artfakajn terminojn kaj pritraktos problemojn de artfaka terminaro.

**La jarkunveno de ISAE** okazos merkrede la 3an de Aŭgusto 1955 je la 11.30 horo en la kadro de la UK en *Bologna*, Italujo. Membroj de ISAE, kiuj intencas partopreni la kongreson, estas petataj informi al ni pri tio.

Sven Alexandersson, sekretario-kasisto.

408.92(041) : 061.3(100)

### Kvarlingva flugfolio por internaciaj kongresoj neesperantistaj

Laŭ teksto ricevita de UEA 4-paĝa flugfolio estas presita en la lingvoj Esperanto, angla, franca kaj germana. Aparta folio kun adresoj de delegitoj de UEA kaj de ISAE en la diversaj landoj estas enmetita. La nederlanda sekcio de ISAE uzas la flugfolion por distribui inter la membroj de neesperantistaj internaciaj kongresoj okazantaj en Nederlando. La stoko estas sufiĉe granda por ebligi ankaŭ al aliaj asocioj aŭ personoj en alij landoj uzi ĝin. La esperanta teksto estas represita ĉi sube. La tradukoj en la ceteraj lingvoj estas kontrolitaj de koncernaj landanoj.

Oni povas mendi ĉe la sekretario de la nederlanda sekcio de ISAE, s-ro F. Winkel, Plataanweg 18, Rotterdam-Schiebroek. La prezo estas 8 internaciaj respondkuponoj por cento da flugfolioj (afranko inkl.).